

Heinrich Heine,
En admirinde bela maj'

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj',
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.